

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

N-ro 24, 20. Marto 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Hörrem (Germ.)


\* Eliras semajne. \*

### Speciala Numero por la Foiro de Breslau (Silezio).

## Breslau kiel Foirurbo.

La voĉoj plimultiĝas, laŭ kiuj germanaj komercaĵoj estas pli kaj pli postulataj en la eksterlando. Antaŭ ĉio estas la konsumo en oriento kaj sudoriento, kiu volonte estas preta aĉeti germanajn komercaĵojn. Ĉie estas bezonataj industriaj ĉiaspecaj, ĉie mankas por-agrikulturaj kaj porindustriaj iloj kaj maŝinoj, konstrumaterialo, transportiloj, vestaro kaj objektoj de la ĉiutaga bezono. Post la multaj jaroj de reciproka izolado fine la popoloj ekkomencas denove interligi la reciprokajn ekonomiajn kaj komercajn interrilatojn, restarigi la internacian interŝanĝon de komercaĵoj kaj per tio kontraŭbatali la ĝeneralan ekonomian krizon kaj direkti la ekonomian rekonstruadon en la ĝustan volon. Eminenta ilo ree kunligi la disŝiritajn fadenojn estas la foiroj.

Breslau depost ĉiam estas la koro de komercaj rilatoj internaciaj, ĝi estas la centro de vastaj fer- kaj ŝipvojoj kaj precipe la ĉefa urbo de lando, en kiu industrio, metio kaj agrikulturo sammaniere estas en malofte atingita stato de kapableco. Jam en antikvaj tempoj estis en Breslau mondfamaj foiroj, kiel la lan-, la lin- kaj la ledfoiroj, sed ne laste la foiro por agrikulturaj maŝinoj, kiu okazos dum tiu ĉi jaro la 52-an fojon.



Magistrata Domo.

La foiroj de Breslau estas aranĝataj de la „Breslaŭa Foirsocio k. l. g.“. La socio havas konsilantaron konsistantan el gvidantaj membroj el la komunuma administraro, el industrio kaj komerco.

La foiroj de Breslau estas aranĝataj de la „Breslaŭa Foirsocio k. l. g.“. La socio havas konsilantaron konsistantan el gvidantaj membroj el la komunuma administraro, el industrio kaj komerco.


Breslau okazigis jam dum la regado de Frederiko la Granda siajn foirojn, kiuj bedaŭrinde poste malprosperis. La novaj vojoj de la tuta ekonomia vivo ree ekvivigis tiujn ĉi foirojn. Tri ĉefaj grupoj antaŭ ĉio ekkaptis decide la ideon pri foiroj kaj efektivas ĝin per ĉiuj fortoj: la famkonata silezia tolteksado kaj la industrio por lanajoj kune kun la speciale en Breslau hejmhava vestaĵ-industrio kaj teksaĵa pogrando-komerco, ĉiujare atestas dum la breslaŭa foiro pri la alta grado de siaj komerca kaj metia povoj. La maŝina industrio de Silezio ĝuas ĝis trans la limoj de sia hejmolando bonan reputacion kaj havas sian klientaron en la tuta mondo. Sed ankaŭ la metio, speciale la armetio estas ege ekflorinta kaj enspiris la industrian agadon ĉiamaniere. Do la antikva Breslau estas ejo de grava laboro kaj kreemo, sed ĝi ankaŭ estas loko de altvaloraj artoj kaj kulturo. Ties atestantoj estas ĝiaj antikvaj preĝejoj kaj katedraloj, ĉiuj belegaj konstruaĵoj barokaj, la ĉarmaj promenejoj kaj ĝiaj parkoj.

Je la kvina fojo Breslau nun invitas la komercistaron de la mondo al la partoprenado de la

## Internacia Printempa Foiro de Breslau okazonta de la 5.—8. aprilo 1921.

La breslaŭaj foiroj akiris daŭran signifon por la ekonomia vivo de la popoloj. La ideo, sur kiu bazas ĉiu foiro, doni al la produktantaro kaj al la komercantaro la eblecon al persona interkomunikado kaj senpera persona ngocado, estas efektiviĝinta modele de la breslaŭa foiro. La pasintan aŭtunan foiron partoprenis 1020 ekspozantoj. Pri la valoro de la foiro kaj la kontenteco de la partoprenintoj atestas, ke granda nombro da ili tuj ree okupis la ĝisnunajn standojn.

La foiron partoprenos en ĉiuj branĉoj la plej kapablaj pogrando-komercistoj kaj fabrikistoj. Ĉe estas la grandaj sileziaj teksejoj same, kiel tiuj el la aliaj germanaj regionoj, precipe el Saksujo



Katedral-Insulo.

kaj Vogtlando, sed ankaŭ el Barmen kaj Elberfeld, Württemberg ktp. La teksaĵa pogrando-komerco povos bone konkuri kontraŭ la fabrikistoj. Treege multnombraj estas la anoncoj de la vestaĵ-industrio: kio ajn apartenas al la homa vestaĵaro estos prezentata. Krome en la grupo por ornamaĵoj kaj galanteriaĵoj, or- kaj arĝentajoj kaj en la fako por armetio montriĝos, ke Germanujo ree atingis la aliecon de sia kapableco kaj povas konkuri kun la komercaĵoj de alia deveno. Nove instalata estas fako por papero kaj paperaĵoj, artikloj, por kiuj la silezia industrio de ĉiam estis modela. Ankaŭ teknikaj kemiaĵoj, sapoj, kandelolaj, parfum-ajoj treege interesos vizitantojn kaj aĉetantojn.  
E.-fako.

## Breslau, la forgesita urbo.

Breslau... Ĉu vi scias, kara leganto, kio Breslau estas kaj kie ĝi estas lokita? Multaj el vi, precipe eksterlandanoj, respondos ĉi tiun demandon per la vortoj: „Certe, Breslau havas lokon en Supra Silezio, kaj ĝi estas preskaŭ pola urbo!“ Ĉar ekzistas eĉ germanoj, kiuj ne povas doni precizan respondon je la supre citita demando.

Sed ĉar vi ĉiuj ne estas pravaĵ, opiniante ke Breslau ne estas vere germana urbo, mi provos pentri en mallonga skizo la aspekton de la ĉef-urbo de Silezio. Kaj mi pruvos per tio, ke Breslau estas vere germana urbo.

Breslau kuŝas en vasta, fekunda ebena sur la bordo de la rivero Oder kaj ĝi havas proksimume 550 000 enloĝantojn. Antikvaj gotikaj preĝejoj kaj barokaj konstruaĵoj sin spegulas en la larĝa rivero. Jam en la fino de l' unua jarmilo Breslau estis episkopa sidejo. Post la invado de la mongoloj,

en la jaro 1241, Breslau estis nove konstruata de germanaj komercistoj.

La urbo mem estas regule konstruita, kaj ĝi estas admirata kiel unu el la plej belaj urbaranĝoj en Germanujo. De la foirejo, kiu estas nomata Ring, elradias bonregulaj stratoj, kiuj interligas la internan urbon kun la antaŭurbaj kvartaloj. En la mezo de la foirejo staras la fame konata magistrata domo, konstruita dum la jaro 1328 en gotika stilo. Ĝi estas la ĉefloko por la urbadministrantaro; sed ĉar ĝi jam delonge estis tro malvasta por la administracio, oni konstruis je la mezo de la pasinta jarcento sur la loko de la malnova urba provizejo novan konstruaĵon, la urbdomon.

La magistrata domo enhavas multajn tre vidindajn salonegojn: la refektorion (germ.: Remter), la princosalonon k. a. En la kela etaĝo troviĝas unu el la plej antikvaj kaj popularaj gastejoj de

Germanujo, la „ŝvajdnica kelo“ (Schweidnicher Keller). Tiu ĉi gastejo estas tre vidinda kaj tial ankaŭ vizitata de preskaŭ ĉiu eksterurbano same kiel de la hejmhavaj breslaŭanoj.

Antaŭ la magistrata domo troviĝas antikva pilorio, nomata „vergeja kolono“ (germ.: Staup-säule). Sur la foirejo antaŭ la urbdomo troviĝas du rajdist-monumentoj, tiuj de Frederiko II. kaj Frederiko Vilhelmo III., kreitaj de la silezia skulptisto Kiss.

En la nordokcidenta angulo de la foirejo superstaras la giganta 91 metrojn alta turo de la Elizabet-preĝejo la antikvajn burĝdomojn.

Pluaj preĝejoj vidindaj estas la Maria-Magdalena-preĝejo, la katedralo kaj la sinagogo. Tre aspektinda estas la romana pordego de la unue citita preĝejo. Unu el la du turoj de la Maria-Magdalena-preĝejo portas la faman konatan „mizerpekulon


sonorilon" (Armsünderglocke), verkon de la breslaŭa sonorilandistino Mihael Wilde (Michael Wilde) el la jaro 1886; ĝi pezas 5650 kg.

La katedralo, konstruita en la jaro 1230, estas la ĉefpreĝejo de la episkopeca regiono Breslaŭo, kaj ĝi havas lokon sur la fiela nomata „katedrala insulo“ (germ. Dominsel), kiu estas disigita de la malnova urbo per la rivero Oder. En tiu ĉi urbrkvartalo troviĝas la princepskopa palaco kaj aliaj klerikaj konstruaĵoj; piega frankvileco regas en ĝi. Tial oni ankaŭ nomas ĉi tiun urbparton „la sankta tero“.

La pligrandigo de la urbo en la 14-a jarcento necesigis novajn defendilojn. Iom post iom estiĝis la urb-foso. Sed en la franca epoko la remparoj estis malkonstruataj, kaj nur du bastionoj restis. Sur la loko de la remparoj naskiĝis la promenejo, kiu preskaŭ tute ĉirkaŭas la malnovan urbon. Ĝi enhavas la du altajojn: la Hollel-(Holta)altajo kaj la Liebhichs-(Libihs)altajo, restaĵoj de la remparoj. Tre belan urb-aspekton oni havas de sur la lastnomita altajo, sur kiu staras interesa konstruaĵo kun terasoj, arkadoj kaj vidoturo.

Entute la promenejoj de la urbo estas longaj 105 kilometrojn. Krom tio la urbo posedas multajn ĝardenojn ornamitajn flacojn kaj vastajn parkojn. Breslaŭo konservis ĝis hodiaŭ la hereditan glorion kiel „promeneja urbo“.

Speciala propraĵo de la breslaŭano estas la amo al la naturo. Kiu ne povas havigi al si ĝardeneton (tiel nomitan „Srebergardenon“) ornamas balkonon aŭ antaŭfenestran breton. Tiuj ornamitaj balkonoj kaj fenestroj donas dum la somero al la stratoj agrablan aspekton.



Katedral-Insulo en Vintro.

Sed ankaŭ stuojaĵoj kaj monumentoj plibeligas la stratojn kaj ĝardenojn de la urbo. Ciŝindaj estas la monumento de Vilhelmo I. apud la ĉefstrato (ŝvajdnicastr.), la Bismarck-monumento kun tre bela fontano, la tombonumento de Taubentzen (Taubencin), la generalo de Frederiko II., meze sur placo, ĉirkaŭmuĝata de la urbega bruado, la skermista fontano (Fechterbrunnen) antaŭ la universitato kaj la Diana-grupo en la ŝajntiga parko.

Meze en la malnova belega ŝajntiga parko kun siaj arbobigantaj troviĝas la fiela nomata jarcenthalo, la fama konstruaĵo el ferbetono, unu el la plej vastaj haloj de la mondo. La jarcenthalo, la festhalo de la urbo, estas konstruita de la urba konstruktosilanto Berg dum 1912/13. Ĝi estis destinita por grandaj koncertoj, spektakloj kaj por

grandamasaj popolkunvenoj, kaj tie ankaŭ havas lokon la breslaŭaj foiroj. La kupola arkiĝo havas 65 metrojn, la planka diametro 95 metrojn, la kupolejo estas alta 49 metrojn. La halo havas suŝincan lokon por 9000 personoj. En ĝin oni metis la plej grandan organon, kiu ĝis nun estis konstruita en la mondo; ĝi enhavas 1400 bilovilojn. Kiam ĝi kuligas siajn tonojn, kiam la tononidoj eliras kaj suprenigas, la aŭsko tanto staras senmove, kortuŝite; la vortoj ekmortas sur la lipoj.

Antaŭ la restaŭrado, kiu terasforme sin apogas al la jarcenta halo, bela senmova artefarita lago sin etendas. La lago ĉirkaŭas duonondajo de duvica kolonara iratrejo, nomita „Pergola“.

Apud la jarcenthalo troviĝas la ekspoziciaĵaj haloj, kvar rondaj konstruaĵoj, interligitaj unu kun la alia. Ankaŭ tiuj ĉi haloj estas okupataj de la foiro.

La vojo de la ŝajntiga parko urben kondukas sur la giganta imperiestroponto, admiriga verko de la tekniko. Ĝi kunigas senpere la du bordojn de la 112 m. larĝa Oder-rivero.

Artemio kaj arto havas bonan lokon en Breslaŭo. La plasilkan kaj pentristan artojn flekas la akademio por arto kaj artemio. La silezia muzeo por antikvaĵoj kaj artemio prezentas objektojn de la praepoko ĝis la hodiaŭa tago. La muzeo por pentraĵoj enhavas kolekton de pli ol 1000 pentraĵoj de Beklin, Ahenbah ktp. (Böcklin, Achenbach). La arheologia muzeo, la princepskopa eparhia muzeo kompletigas ĉi tiujn muzeojn.

Tiel la eksterajo de la urbo respegulas la multspecan kulturvivadon, kiu donas la karakteron al Breslaŭo, la centro de la intelekta, socia kaj komerca interkomunikaĵoj por la suda Orient- Germanujo.

Goho.

## Esperanto en Sovjeta Ruslando.

Lastatempe nin atingis diversaj sciigoj, raportoj, leteroj, eĉ gazetoj el aŭ pri tiu lando, kiu dum kelkaj jaroj resitis fermite al la sciemo de la esperantistoj.

Ĉi-sube ni represas unu el la plej interesaj de la ricevitaj dokumentoj, — leteron, kies enhavon afable disponigis al ni la delegito de UEA en Warszawa, s-ro Adolfo Oberrotman. La letero donas klaran kaj facile kompreneblan resumon pri la diversaj klodoj kaj tendencoj, per kiuj la rusaj samideanoj provis — kun pli-malpli bona sukceso — disvastigi Esperanton en sia lando.

S-ro Oberrotman ricevis la leteron de nia Moskva samideano N. Niekrasov, prez. de Junulara Asocio Esperanta en Moskvo, sekr. de Tutruslanda Literatura Asocio (ELA), kiu lastatempe devis militservi en la boŝevika armeo kaj en septembro 1920 estis militkaptita de la poloj en Kovel; li nun troviĝas en pola militkaptitejo Strzalkovo. La unua letero, kiun li sukcesis forsendi el la militkaptitejo al la delegito, estis peto helpi lin per esperantaroj, interrilataj lin, se eble, kun diversaj UEA-delegitoj eksterlandaj kaj fari al li kelkajn ŝervojajn; lia peto estis plenumata.

Interalie s-ro Niekrasov rakontas, ke dank' al lia perado fondiĝis en militkaptitejo Strzalkovo Esp. grupo kun 20 membroj; kelkaj jam bone parolas kaj skribas, sed la manko de rusaj kaj polaj lernolibroj malhelpas lin en lia plua agado. La delegito de UEA en Warszawa, s-ro Oberrotman, Krak-Przedm. 10, estas preta, esti peranto kaj transsendi korespondajn ktp. al s-ro Niekrasov.

Jen kion s-ro N. skribas pri la Esp. movado en Ruslando ĝis septembro 1920:

Pri la stato de Esperanta movado en Sovjeta Rusujo ekster ĝiaj limoj, videble, oni scias tre malmulte, kaj en kelkaj okazoj oni eĉ havas kelkajn ne tute respondantajn al la efektiveco iluziojn. Sed se ni forĵetos flanken ĉiujn ligitajn kun ĉi tio supozojn kaj konkludojn, tiam vere restos la senkondiče videbla fakto, ke Esperanto en Sovjeta Rusujo, malgraŭ ĉiuj kondiĉoj kaj eĉ ekokvoj, vivas, disvolviĝas, floras sentese kaj senhale. Tamen estus eraro nomi alta la nivelon de tiu ĉi granda movado — malrekte kaj larĝe ĝi iras per profundaj fluejoj, kaj nur la ideo de profundeco povas respondi al ĝi en suŝita mezuro.

Kiam eksplodis la marta revolucio de 1917 j., larĝaj perspektivoj malfermiĝis antaŭ la rusa Esperanta movado. La interna socia vivo levigis ĝis entuziasmo kaj rapidis esprimiĝi en ĉiu oportuna okazo. Okazis multaj esperantistaj publikaj prelegoj, vesperoj, kunvenoj kaj eĉ manifestacioj. Kaj denove el arĥivoj estis elfosita la malnova projekto pri Tutrusa Ligo — tiu ĉi fatala kvazaŭ ensocrita demando de rusaj esperantistoj. Somere en Moskvo okazis organiza kunveno kaj estis elektita Organiza Komitato de Tutrusa Esperantista Federacio (OKTEF), en kiun eniris komence A. Prager, B. Breslaŭo, N. Jeltov, T. Friedrichsen kaj a. Organiziĝis rilato kun provinco. En ĉiuj anguloj ekvigiliĝis la laboro. Multaj grupoj kaj rondoj fondiĝis tiutempe en tuta provinco. Kaj dum la disfloro mem de la movado, pro la ironio, pro malgravaj, ĉesas aperi la gazeto „La Ondo de Esperanto“, centro de la tuta laboro. Tamen tio ĉi ne haltigis la movadon. Kaj eĉ la alveninta tiam novembro boŝevika revolucio komence faras preskaŭ nenian

influan al la laboro. Nur post kelkaj monatoj unufoje okazas karakterizaj personaj disputoj, fin-fine farintaj en OKTEF suŝice grandan breĉon kaj paralizintaj ĝian agemon. Kaj de tiu ĉi momento la malnova revo pri III-a Tutrusa Kongreso de Esperantistoj en Moskvo<sup>1)</sup> fariĝas jam mita.

Baldaŭ ĉio ĉi fariĝas konata en provinco, eks-citane generalan malkontenton. Ankaŭ la urbo Saratov komencas ludi rolon de granda Esp. centro. Tie ĉi la Esperanta laboro prenas komence kooperativan formon, fondiĝas la kooperativa eldonejo „Volgano“, kiu eldonas kelkajn librojn en kaj pri Esperanto en tri serioj: propaganda, scienca kaj literatura. Krome oni entreprenas la eldonadon de du gazetoj: propaganda „Volga Esperantisto“ kaj literature-socia „Libera Torento“ kaj fine en aŭgusto de 1918 en Saratov okazas I-a konferenco de la apud-volgaj esperantistoj. Grigoroviĉ, Miĥajskij, Staroĵickij, Romanoviĉ k. a. partoprenis tie ĉi ageme.

Dume OKTEF limiĝas sole per la eldono de n-roj 3-4 de „Oficiala Buleno“ kaj per la projekto de „Esperanto-Kooperacio“; sed ĝi restas sen fortoj kontentigi la generalan celadon. Komenciĝis emo al genera eldonado. Ciuj, kiuj nur povas, eldonas Esperantajn gazetojn: en Astrahan sub redaktado de Kurjanskij eliras tre interesa gazeto „Nia Vivo“, en Petrogrado sub redaktado de Nedoŝivin eliras la semajna folieto „Petrogarda Revuo“, en Kazan aperas „Kredo“, kaj pri la hektografitaj gazetoj eĉ ne estas necese paroli; eĉ la pastro Sirjajev, ie en la gubernio de Volgoda eldonas „La Rondiranton“. Multnombraj bagatelaj faktoj povas esti konsiderataj kiel tre karakterizaj por tiu ĉi tempo. Tamen ne la simpla disigo kaj malforteco de la centro ilin kaŭzas. Multe pli profundaj kaŭzoj fariĝis ilia fundamento: La pure ekstera kondiĉoj, el unu flanko la influo de la travivata revolucio, kaj el la alia la rompiĝo de ĉiuj ordoj de vivo kaj precipe de penso, kreintaj certan haoson en la tuta rusa vivo, influis ankaŭ la rusajn esperantistojn, ĝis fine tiuj ĉi ekhaltis ĉe disvojo.

(Finota.)

<sup>1)</sup> II-a kongreso, kiel oni scias, okazis en Kiev ankoraŭ en 1915 jaro.

## Esperanto en Polio.

VARSOVIO. La delegito de UEA s-ro Ad. Oberrotman faris propagandon inter la anoj de Angla-Amerika Misio de Amikoj; ĉiuj esprimis sian favoron al Esperanto. — Angla samideano, s-ro Geo Dutch, membro de la Angla Misio de Amikoj, vizitis la urbon; interalie li vizitis ankaŭ s-inon Zamenhof, d-ron Zamenhof k. a. La delegito de UEA faris al li kelkajn ŝervojajn. — Nova Esp. grupo fondiĝis sub la nomo „Konkordo“, kiu havas la celon disvastigi Esp. kaj precipe la internan ideon en Polujo. La grupo „Konkordo“, fondita de la plej eminentaj varsovijaj samideanoj, promesas bonege disvolviĝi kaj vigli la tutan movadon, kiu en lasta tempo tie ĉi dormis.

BIALYSTOK. La 21. nov. 1920 okazis en la ejo de „Instruita Societo“ organiza kunveno de bialystokaj samideanoj. Ĉeestis 20 personoj. La kunveno malfermis la loka delegito de UEA, s-ro J. Sapiro, invitante kiel prezidanton s-ron Ks. Alfus (el Krakovo) kaj kiel sekretarion s-ron

Placek. Estis decidite fondi Esp. societeton sub la nomo „Zamenhofa Esp. Societo“ por honori tiamaniere la memoron de la majstro-bialystokano. La elektita estraro konsistas el s-ro J. Sapiro (prez.), F. Kurjanski (sekr.), R. Placek (kas.), S. Kaplan kaj S. Lieberman. Oni komisiis al la estraro tuj organizi kursojn, bibliotekon kaj legejon. Nun funkcias ĉe la societo kursoj kun 40 partoprenantoj. Nova kurso, aranĝita de Z. E. S., komenciĝis ĉe la Studenta Societo kun 30 aŭskultantoj. La societo aranĝis monokolekton por memoriga tabulo je la naskiĝdomo de la majstro. — S-ro M. Zabłudowski instruas Esp. en la kvina klaso de la hebra popolernejo „Perce“. — La loka gazetaro favoras nian movadon.

LESZNO apud Varsovio. En tiu vilaĝo tre vigle laboras pastro Adam Furmaniĉ, kiu plejparte propagandas ĉe mariavitoj. Oni intencas enkonduki Esp. en la progimnazio.

RAKOW. S-ano Bolesław Gliuchowski tie multe laboras por Esperanto. Speciala propagando inter instruistoj.

SIEDLCE. Esp. kurso, gvidita de s-ro Cz. Pruski, del. de UEA, ius finiĝis. Nova jam komenciĝis. Kunvenoj de la loka unuigo esperantista „La Radio“ okazas regule ĉiŝabate. La unuigo eldonas rondiran gazeton „La Radio“, ekskizuive por siaj membroj.

STRZALKOVO. Vidu la rimarkigojn super la artikolo „Esperanto en Sovjeta Ruslando“.

### Alvoko.

La komitato de nove fondita (la unua en Bialystok) Zamenhofa Esp. Societo atable petas ĉiujn Esp. societojn, grupojn, redakciojn kaj apartajn samideanojn sendi al ĝi esperantajjn laŭ adreso: Bialystok, Polujo, ul. Lpowa 53, s-ro J. Sapiro (por Z. E. S.) por la malfermita biblioteko, ĉar la maibonegaĵ valutokondiĉoj malhelpas la aĉetadon.

Bialystok, la naskiĝurbo de nia Majstro, bezonas esperantistojn! Samideanoj, aĉentu kaj helpu!

La redakcioj de Esp. gazetoj bonvolu afable sendi senpage po unu ekz. por la legejo.

Ĉio estos kun danko akceptata kaj la ricevo ĉiam konfirmata aparte.

Kun samideana saluto!

Zamenhofa Esp. Societo en Bialystok.

## Instituto de Sociografio.

La supre nomita instituto dissendis regularon, el kiu ni represas jenon:

La Instituto de Sociografio, fondita la 1. Jan. 1921 en la urbo Fortaleza, Ceara, Brazilio, estas societo por la lernado kaj instruado de la sociaj sciencoj per Esperanta lingvo.


La celoj de la Instituto estas: studi la socian vivadon; disvastigi la sciencajn konojn, kiuj celas la plibonigon de la homa vivo; instrui la internacian hepan lingvon Esperanto; reprezenti en Brazilio la Esp. gazetaron la socian gazetaron france, portugale, hispane, katalune kaj itale, bibliotekon, lernejojn kaj aliajn sociajn instituciojn; korespondi kun la gesamideanoj de la tuta mondo pri la socia fenomenoj, la ĉiunaciaj historio kaj geografia, la religioj, la lingvoj, la homaj rasoj, la internacia socia movado, kaj la intelekta, estetikaj, morala kaj fizika edukado de la infanaro.

La Instituto intencas eldoni oficialan organon sub la titolo „La Sociografio“.

Provizora adreso: P-ro Moacyr Caminha, Boulevard Nogueira Acicoly, Fortaleza, Ceara, Brazilio.

# La unua granda sukceso en Finnlando.

Finnlanda parlamento vobonas subvencion al Esperanto. — 25 000 markoj al Esperanto-Asocio de Finnlando.



BESITHI. — LIEDICHS-AHAYO.

## Opavendado de ET.

Laŭ nia iniciato ET nun estas ope vendata en jenaj urboj: Bamberg, Béziers, Essen, Gålle, Hengelo, Koblenz, Malmô, Mannheim kaj Rovereto. Ankaŭ en aliaj urboj (Braunschweig, Potenza ktp.) oni volas fari provon.

Al ĉiuj samideanoj volantaj aranĝi la opan vendadon en sia urbo, ni liveros dufoje 10—20 ekz. de nia ĵurnalo senpage. Poste la vendisto aniaŭpagu por unu monato, aŭ prefere li sendu al ni certan sumon, por ke ni starigu por li konton. Nevendblajn ekzemplerojn ni reprenos. Por la vendistoj estos rabato de 30%. Nia kondiĉo: li devas minimume vendi po 5 ekzemplerojn.

Do, por ke la arango havu sukceson, estas necese, ke kelkaj (2—3) samideanoj en la konkerna urbo sin kvazaŭ devigu posemajne aĉeti la ĵurnalon ĉe la vendisto. Iri ĉiusemajne al la stacidoma gazevendejo kaj oferi po 1 mk., 10 cendojn, 2 1/2 pencoj ktp. ne estas tro granda ŝarĝo por ĉiu; eĉ estos pli facile elspezi por Esp. ĵurnalo dudekfoje 1 mk. ol unufoje 20 mk.

Ni eĉ ĝojis — kvankam per tio ni perdis monon — se en ĉiu urbo 2—3 el niaj abonantoj malabonus kaj sin devigis aĉeti la ĵurnalon ope ĉe la stacidoma gazevendejo.

Povus ŝajni laŭ tio, ke ni ne sufiĉe atentis la materialan flankon de nia entreprenado. Certe, nia entreprenado estas ankaŭ ĉio ideala afero, fondita por akceli la internacilingvan movadon; sed entreprenado bazita ekskluzive sur ideala fundo ne povas daŭre ekzisti kaj estas tute dependa de la bonvolo de sia fondinto. Do, ke ni ankaŭ ne forgesas la materialan flankon, ni montras en posia artikolo.

## Kroniko.

**BAMBERG** (Bavario). Por la prelejoj de s-ro Reber en la Liceo enskribis sin 69 geaŭskultantoj.

**BUDAPEST** (Hung.). La 2-an de marto estis en la laborista hejmo de IX-a distrikto bonsukcesa Esp. prezentado kun propaganda laŭleĝo de s-ano Major, kun kantoj kaj malgrandaj ĵumorajoj, kiujn oni prezentis al la aŭskultantaro pleniginta la ĉambregon kun granda fervoro kaj entuziasmo, kiu ofte anstataŭis la arton de la prezentantoj. La fia grupo aranĝas dimanĉe bonsukcesajn ekskursojn. — La 28-an de marto (pasklunde) pm. je la 4-a, estos en la Socia Muzeo (VI, Eörvös u. 3) jarkunveno de UEA kaj poste te-posttagmezo kun prezentadoj. (Ĉiu ricevos teon, sed sukeron kaj tason oni devas kunporti.)

**MALMO** (Svedio). La Esp. klubo havas viglajn membrojn. Kurso kun 10 p. Monaĵa vesperoj pomonate. En la urbo oni nun estas pli favora al Esp. ol antaŭe. S-ro Erik Andersson faris parolon pri Esp. en ĵunula unuigo, kantante, deklamante ktp. Rezultato bonega. Oni tuj fondis apartan Esp. unuigon. Kurson fervore partoprenintan de 30 p. gvidas s-ano Andersson.

**NÜRNBERG-FÜRTH** (Bavario). Por ebligigi pli efikan kaj pli grandan propagadon la sekvantoj Esp. grupo en Nürnberg kaj Fürth fondis la „Esperanto-Kartelo Nürnberg-Fürth, Nürnberg, Heiferplatz 9“:

Germ. Esp. Asocio, loka grupo Nürnberg, Germ. Lab. Esp. As., loka grupo Nürnberg, Katolika Esp. Grupo, Nürnberg, Esp. Grupo „Verda Rondo“, Fürth, Katolika Esp. Grupo, Fürth.

En la unua kartelkunveno oni elektis prez. s-ron Otto Piihoffer. La kartelo volonte intertrilatos kun gruparaj en aliaj urboj.

**POTENZA** (Ital.). Ĉe la episkopa palaco okazis dimanĉon, la 6-an de marto, Esp. ekspozicio kun paroladoj de lia episkopa moŝto Mons. Razzoli, honora konsilanto de l-ka, kaj de s-ro F. Cesarini, prez. de la grupo de Potenza kaj delegito de UEA.

## La franca komerca ministro favora al Esperanto.

La franca ministro de komerco kaj industrio sendis al s-ro Méras, direktoro de la Internacia Komerca Oficejo Esperantista ĉe la Universa Komerca Muzeo en Paris skvantan leteron:

Ministerio de la Komerco kaj de la Industrio. Paris, la 10. febr. 1921.

Sinjoro,

Vi direktis mian atenton al la Esp. sekcio de la Universa Komerca Muzeo, 5 s-roto de Chaillou, por kiu vi deziras obtieni la patronadon de mia departemento.

Ĉar mia administracio faris al si la absolutan regulon ne patroni oficiale privatan entreprenon kiam ajn, mi ne povas akcepti vian peton en la formo, kiun vi donis al ĝi. Sed ĉar la ideo uti Esperanton en la disvolvigo de niaj komercaj rilatoj kun la eksterlando ŝajnas al mi interesa, mi ire volonte anoncis vian institucion al la Nacia Oficejo de la Eksterlanda Komerco, kiu certe donos al vi sian helpon laŭ ĉiu mezuro, kie ĝi povas tion fari.

Akcepti, sinjoro, la certigon de mia perfekta konsidero.

## 500 Oficistoj en München lernas Esperanton.

Inter la trafikaj oficistoj de München (Bavario) la Esp. movado multe progresas. Unue s-ro supera poŝta administristo Jacob (ĉe pakaja poŝtoficujo München), komisiite de la imperia poŝta ministerio sekcio VII, faris du multnombrem vizitajn paroladojn pri Esperanto kaj ĝia signifo por la poŝt-, telegraf- kaj telefon-oficistoj. Nun ankaŭ s-ro fervoja sekretario Hechtl (ĉe komerca stacio München-Schwabing), komisiite de la fervoja direkcio München, faris du paroladojn pri Esperanto por la fervoja oficistaro. La paroladoj kaj same la ekspozicio, aranĝitaj de München-aj esperantistoj en la imp. poŝta ministerio sekcio VII kaj en la ĉefstacidomo München, havis la rezultaton, ke ĝis nun 340 poŝt- kaj pli ol 150 fervojoficistoj sin anoncis por la kursoj aranĝitaj de ambaŭ trafikaj administracioj. La kursojn por la poŝtistoj gvidas s-ro Jacob, tiujn por la fervojistoj s-ro Hechtl.

## Grafologio.

Gesamideanoj dezirantaj ricevi certan, sciencan respondon pri siaj karakteroj, emoj kaj kvalitoj, sendu 2-paĝan leteron, **nature kaj senprempse skribitan** (nek dikite nek kopie) al **GRAFOS**, Casella postale 47, PISA (Ital.) ĉesendante 1 Ital. lir. (aŭ valoron, en nacia monno, de 2 n roj de ET laŭ favora monkurzo) por respond-elspezoj k. a. (Oni sciigu laŭdire ankaŭ pseŭdonimon krom la subskribo!) La respondoj aperos laŭvice duonmonate en ET.

## Respondoj (nevole prokrastitaj).

**XANTIPPE**. Klereco kaj intelekto, forta sentemo, sindonemo, ne tre forta volo, emoj pozitivaj sciencoj, ĉarmo, scivolo, ofendensentemo, momentoj de melankolio. — Certe la pseŭdonimo-ne konvenas al via ĝentila animo: vi tute ne similas la malbelan, koleran, antipatiigan Sokrat-edzinion, nek la kokinan al kiu si ĉiŝis simila (laŭ diro de ŝia edzo).

**SOKRATES**. Bona kaj sprita inteligenteco, larĝaj aspiroj, pacemo, persistemo. — Mi neniel rajtas kontraŭdiskuti vian intencion fariĝi kuracisto: medicino estas vere bonfaranta kaj laŭdinda profesio, ofte tre konvena por virino, kaj ankaŭ utila por bona patrino. Tamen . . . ĉu vi ne estas filozofino, kiel via pseŭdonimo ekspozigu?

**ROCT**. Tre klara kaj tre logika intelekto, riĉa je observemo kaj klaraj ideoj. Modera fantazio, ordemo, pacienca kaj konstanta volo, lojaleco, ideo al la celo sen-diflankegoj. Interesemo al novaĵoj, emoj al soloca pripensado. — Ektive 1 Ital. lir. egalus 4 R.-K. Tamen ni tiakaze preferus nactan monon, t. e. 3 germ. markojn. Vidu ĝenerale en antaŭscigoj.

**VILLI**. Mi ne povas konsenti kun vi pri tia neesto de sentemo. Krom via skribo, ankaŭ la temoj de vi riparoligitaj montras impresimon kaj fantazion (pli ol sinregado). Kiel aĝa vi estas? Skribu pli detale dezirante pli precizan respondon. Cetero mi trovas en vi fortan volon, observemon, frograndigemon, vantecon, artajn emojn, larĝajn perspektivojn.

## Tra la Mondo.

La germana registaro sendis al la ĝeneralsekretario de la Ligo de Nacioj protestojn kontraŭ la „sankcioj“ de la entento, kiuj estas konsiderataj de Germanio kiel jurromp.

La belga registaro intencas preni prunto de unu miliardo da francoj por la konstruo de fervojoj en la Kongo-kolonio.

Ukraina popolo en Galicio festenis la 24. febr. la 80-jaran naskiĝan datrevenon de unu el siaj plej eminentaj sociaj gvidantoj kaj parlamenta prezidento de Galicio en Lvovo, s-ro Julian Romanĉuk. A. K.

El Firenze oni komunikas, ke la rusa grandprincino Nikolaj Nikolajevič mortis en sia bieno en Toskano.

La Printempa Kongreso de Revelo en Köln (10. aprilo) promesas fariĝi unika provinca kongreso de Esperanto. Jam anoncis sin pli ol 260 partoprenantoj. Adreso: Köln, Hohestr. 26.

## Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldono de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

LETERO EL KONSTANTINOPOL.

Marto 1921.

En tiu ĉi epoko nia urbo trapasas grandegan komercan kaj ekonomian krizon, kia neniam antaŭe estis montrita en ĝiaj komercaj analoj. La granda tendenco, kiu estis en la komenco de la interpaco, koncerne la importadon el Eŭropo, koncentris ĉi tie grandegan kvanton da komercaĵoj, kiu restas nedisponebla en la magazenoj de komercejoj, sed precipe en la tenoj de la bankoj kaj de la doganoj. La eksportado tute haltiĝas. Oriento troviĝas en revolucio, kaj ni ne interkomunikiĝas. Rusujo estas ankoraŭ sieĝata por ni. El tiu lando venis ĉi tien multego da elmigrintoj. Sufiĉegas tiuj, kiuj ne trovas laboron; la oferto estas ĝenerale pli granda ol la demando. La turka monbileto ne estas tre rabatata, malgraŭ ĉio ĝi multe suferas pro la pivaluto de la kambio, precipe tiu sur Londono aŭ Nov-Jorko. La politika senkonstanteco kaj la sintenado de la entento kontraŭ Turkujo estas la kaŭzo de la tuta siĉuacio.

Kavalieros Markuzo.

## Lernejo.

**WORMS** (Germ., Hessen). La 12-an de marto okazis ekzameno de dudek 14-jaraj knaboj instruitaj en Esperanto de s-ano Fritz Pfaff. Kiel gastoj aŭtistis i. a. la landa ministro por klerigaj aferoj d-ro Strecker kaj reprezentantoj de la komerca ĉambro kaj de diversaj lernejoj. Ĉiuj ĉesintoj estis frapaĵaj, kaj la ekzameno estis plena sukceso. La ministro tulkore gratulis kaj atentigis la gastojn pri la altvaloraj klerigaj kvalitoj de Esperanto kaj ĝia signifo por la interpopolaj rilatoj. Ekspozicio kunhelpis al la sukceso.

**FINNLANDO**. La evangeliaraj popol-alternejoj de Mäkipää (Karkku) kaj de Radansuu (Jitti) akceptis Esperanton en la instruoplanon. Ĉiuj lernantoj partoprenas (en la unua 49, en la alia 25).

## Gazetaro.

**L'ORDRE NATUREL**. Gazeto individuista. Paris. 3. marto.

Enhavas artikolon de E. Adam pri „L'Espéranto solution de fait de la langue internationale“.

**L'AVENIR**. Paris. 19. kaj 20. febr.

Enhavas bonajn propagando-artikolojn por Esperanto, de s-ro Chaumet, eksministro de la francaj poŝtoj kaj telegrafoj.

**VOLKSZEITUNG**. Bromberg (Polio). 19. febr., 5. marto kaj 12. marto.

Daŭras propagandi Esperanton en ĉiuj numeroj.

# Parolejo.

62.

## Studento kaj Profeso.

La tiel nomataj internaciaj vortoj, uzataj en preskaj ĉiuj eŭropaj lingvoj, ofte estas internaciaj nur laŭ sia formo, sed ne laŭ la signifo. Ilia uzado do ne malofte kaŭzas malbonan komprenon. „Hospitolo“ estas tia vorto, kiu signifas en kelkaj lingvoj „malsanulejo“, en aliaj „senhejmulejo“, en mia nur „frenzelejo“. Tiajn vortojn ni plej bone evitu aŭ uzu kun singardemo.

„Profesoro“ estas ankaŭ tre malfacila vorto. Francoj uzas ĝin kopiante ĝian francan signifon de „instruisto“. Sed ŝajnas al mi pli bone diri „instruisto“, se oni parolas pri instruisto. „Profesoro“ estas ne ĉia instruisto, sed speciala — plej alta rango de instruisto: universitata. Kaj la lernantoj de profesoro estas studentoj, i. e. junaj homoj, kiuj per abituriata aŭ simila ekzameno akiris la rajton enskribiĝi ĉe universitato aŭ simila instituto.

En „Esperanto“ UEA n-ro 2, 1921, p. 51, sub rubriko: Francio, Paris, oni legas pri la „Internacia Federacio de la Naciaj Asocioj de Lernantoj“. „Unue mi miris: kiaj lernantoj? Sed el la kunteksto mi poste komprenis, ke la parolo estis pri studentoj.

La anglaj esperantistoj ofte uzas „studento“ pri ĉiu eĉ lernanto — juna infano aŭ 80-jara maljunulo; franco tuj laŭ la ĵusa ekzemplo, diras lernanto pri studento. Tio kaŭzas konfuzon.

Oni uzu la vortojn en Esperanto laŭ ilia preciza Esperanta signifo, ne nur plagiante sian gepatran lingvon.

(Paul Nylén.)

## Recenzejo.

### LIBROJ.

**VOLLSTÄND. LEHRBUCH DER WELTHILFSSPRACHE ESPERANTO.** Konciza kaj facile komprenebla lernolibro por kurs- kaj meminstruo, de ĉ. ro A. Moebusz, seminaria direktoro en Lübeck. Kvara plibonigita eldono. 14: 22 cm. 150 pĝ. Eldonejo: Otto Nemnich Verlag, München kaj Leipzig. Prezo: 7.50 mk. kaj 20<sup>o</sup>/<sub>100</sub> T. (multekosteca aligo).

Ĝus aperis la kvara eldono de la bona lernolibro de ĉ. ro Moebusz. — La aŭtoro zorgeme prilaboris kaj pliriĉigis ĝin, forigis el ĝi kelkajn malpli taŭgajn esprimojn, iom ŝanĝis da lecionojn kaj kompletigis la lernolibron aldonante al ĉiu leciono specialajn ekzercetojn, kiuj facile paroligas la lernantojn. Precipe por instruantoj la nova aranga estas bona helpo. — La preso estas senripoca. La solvaro de la tradukotaj taskoj (prezo: 2 mk) kaj riĉenhava vortaro (prezo 2.50 mk) estas en apartaj libretoj. — Ĉiu, kiu atente kaj diligente estos finstudinta ĉi tiun kompletan lernolibron, scipovos Esperanton. (G. Ajul)

### GAZETOJ.

(Pro manko de loko ni nur kvitanas la ricevon de jenaj Esp. gazetoj.)

- Amerika Esperantisto, febr.
- Brazila Esperantisto, okt.-dec.
- Der Deutsche Arbeiter-Esperantist, marto.
- Esperantista Laboristo, marto.
- Esperanto Praktiko, marto.
- Francsa Esperantisto, marto.
- Hispana Esperantisto, febr.
- Itala Esperantisto, febr.
- Kataluna Esperantisto, marto.
- Kristana Espero, 1921, n-ro 1.
- La Semisto, febr.
- La Vojo, marto.
- Le Monde Espérantiste, jan.-febr.
- Nova Tempo, febr.
- The British Esperantist, marto.
- Verda Utopio, dec.

## VAPOR-MAŜINOJ

horizontalaj kaj vertikaj, kun vapordivido per klajpoj aŭ glifermiloj, ĝis la plej grandaj ampleksoj kaj de diversaj sistemoj, i. a. kontinua vapor-maŝinoj Stork-Stumpf.

**Fratoj Stork kaj K-io, Hengelo (O), Nederl.**

Nur petoj de gravaj firmoj estos respondataj.

## = Firmoj =

kiuj havas intereson por germanaj komerc-ajoj (egale de kia branĉo) kaj kiuj serĉas interrilaton kun germanaj firmoj, sin turnu al

**Karl Purfürst, Plauen i. Vogtl.**

Schlessfach 154.

Importo. General-Agentejo. Eksporto.



**Janke & Kunkel,**  
Köln a Rh.  
(Rejnlando, Germanio)  
Fabriko de Kemiaj kaj Fizikaj Aparatoj

estas liveranto de kemiaj, fizikaj kaj :: elektraj instruiloj :: kaj de kestoj por fari :: eksperimentojn ::

Nur seriozaj aĉetantoj petu antaŭkalkulon!

## CIGAROJ!

Kun la eksterlando serĉas diversajn rilatojn sinjoro **Mühlpfordt,** Cigar-fabriko, Neumarkt 50, Merseburg/Saale, Germ.

# Internacia Foiro de Breslao

## Printempa Foiro

5-a ĝis 8-a Aprilo 1921

Teksajoj, vestaĵoj, ornam- kaj bijuteri-komercaĵoj, or- kaj arĝentaĵoj, armetio, masir-umadartikloj, mebloj, ludiloj, papero kaj paperaĵoj, nutraroj, drogoj kaj kemiaj produktaĵoj.

Informojn donas

## Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

Esperanto-fako

Breslao I, Ohlauerstr. 87.

# 3a Internacia Specimena Foiro en Padova (Italio)



1.-15. Junio 1921.

Unua foiro en Italio en neprovizoraj konstruaĵoj (24000 m<sup>2</sup>) kaj tute kovritaj trairejoj, en propra kvartalo de 160000 m<sup>2</sup>.



Ĉiulandaj komercistoj egalkondiĉe akceptataj. Ĉiuj industrioj allasataj.

Senpagaj Esperantaj presajoj kaj ĉiuj informoj pri partoprenado, vizitado kaj organizado haveblaj ĉe Ufficio Informazioni della

## 3-a Fiera Internazionale di Campioni in Padova (Italia).

### Anoncoj.

**ĈEHOSLOVAĜOJ ATENTU!** Studento E. Feitke, Oppeln, Ring 11, Supra Silizeo, konante la polan lingvon, deziras elerni per korespondado kun ĉeĥoslovake aŭ -ino la ĉeĥan lingvon kaj laŭ deziro rekompence instruos la polan lingvon. Li intencas partopreni la XIII-an.

**RETROVINTO.** La delegito de UEA en Varsovio sciigas, ke en Strzalkovo (Polio) troviĝas rusa militkapito nia fervora s-ano N. Nickrasov. Lia adreso estas: Obor jencov n-ro 1, Strzalkovo (Polio), Kancelariaj oddr. 1, N. Nickrasov.

**ESP. GAZETOJN** intersangas, postmarkan kolekton je favoraj prezoj proponas kaj siajn verkojn „La Bulgara Lando kaj Popolo“ kaj „El la proksima Oriento“ (ambau kun trikoloraj etnogr. kartoj) por 80 gmk. vendas: Ivan Krestanoff, Karlovo (Bulg.).

**BILDKARTOJ** Kirschner Frigyes, Budapest VIII, Örömvögy-utca 10a, 1-11, kolektas bildkartojn de jenaj pentristoj kaj grafikistoj: L. Kreŝtin, S. Hirsberg, E. M. Lillen, Pasternak, Kaufmann, M. Gontlieb, Oppenheim. Rekompen- cas per kartoj de famaj hungaraj pentristoj aŭ laŭ deziro.

**DESEĜNO-PAPERO.** Johano Toman, Budapest IX, Gat-u. 25, 1-8, petas universitatajn studentojn sendi al li fulfolajn desegno-paperojn; ĉar en Hungario ĉiu nur karege estas riceveblaj. Ĉiun sendon li tuj rekompen- cas per esperant-ajoj.

**DU RUSAJ JUNULOJ.** Leo Soltirki kaj Johano Kuĉerenko, deziras partopreni la XIII-an kaj petas gesamideanojn al ili helpi. Ili marŝos piede por propagando dum vojaĝo. Ili petas sendi monon nacian, kiel oni povas; kiel dankon ni resendos al ĉiuj sendotoj nian ambaŭn folotrajton. Oni sin turnu al s-ro Joh. Cucerenko, str. Leo Tolŝtoj 50, Bendera Tighina, Besarabio, Rumanio. — Monon sendu en rekomendita letero aŭ per poŝtmandato. Aliaj gazetoj bonvolu represi.

**SPORTO.** Eugeno Mayer, Budapest VII, Dob-u. 36, faz. 3, deziras korespondi precipe kun sportistoj kaj intersangas atletikajn poŝtkartojn ilustr. Certe respondas.

**SENDU TIUJ** vian adreson aŭ anoncon por 5-a eldono de „BES-a Adresaro de Esperantistoj!“ Postulu senpagan prospekton! — Bohema Esperanto-Servo, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

### DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERSANGI:

- S-ro Imre Kelmán, oficisto, Szechenyi u. 45, Miskolc (Hungario) deziras korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj pri kiu ajn temo kun francoj, belgaj kaj precipe kun anglaj kaj amerikaj gesamideanoj; ĉiam respondas.
- Othmar Calisto, Sparbersbachg. 3-II, Graz (Stirio), deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj.
- S-ro Schwarz Benő, Budapest VII, Garay-tér 16-11-10, deziras korespondi letere pri pacifismo, socialaj demandoj kaj koncernaj interrilatoj kun ĉiuj landoj.
- S-ro Wasserburger Bela, Szombathegy (Hungario), Erzsébet kiralyne ul 37, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.
- S-ro Ladislao Hölzel, Budapest VII, Garay-tér 15-1-12, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.
- Matyas Kirchnerp. Budapest X, Sörgyar-u. 8202, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr., intersangi sloŝilojn kaj gazetojn.
- F-ino Margareto Toman, Budapest IX, Gat-u. 25-1-8, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj.
- S-ro L. Naray, Kispeszt (Hungario), Kossuth-Lajos-u. 50, deziras korespondi pri socialismo kaj laborista movado, per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.
- S-ro Ernst Kloppenburg, Hagen-Deistern (Westf., Germ.) deziras korespondadon kun samideanoj en ĉiuj landoj. Tuj respondas.
- I. Major deziras korespondi kun angliolingvanoj Esperante kaj anglo. Budapest IX, Remete str. 36-II-4.
- Emeriko Strasser deziras interkorespondadon kun ĉiulandaj fervojoj-laboristoj. Budapest IX, Remete str. 36-II-8. Kiu volas korespondadi kun hungaraj ferlaboristoj, skribu al: Ferlaborista Esperanto Grupo, Budapest VII, Thö- kölyi-ul 56.
- Jos. Jacob, supera poŝt-administrato, München 2, N. W. 10, Blutenburg Str. 17 L, (Bavario), deziras korespondi kaj intersangi poŝtkartojn kun gepoŝtoficistoj eksterlandaj,

Mi vendas hungarajn poŝtmarkojn, multe pli malkare ol katalog-prezoj. — Kolomano Wiesinger, Budapest VII, Wesselenyi str. 50.

**Antal Szöllösi,** Budapest V, Lipesti rakpart 2, Varosi har, lernanto, intersangas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj. Emilio Klamert, Budapest VIII, Prater str. 46-1-8, deziras intersangi papermonon, insignojn, poŝtkartojn ilustr., leterojn, poŝtmarkojn, kaj Esp. gazetojn.

**Karlo Paszy,** Budapest VIII, Erzsébet k. u. 54, intersangas poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn, gazetojn kun ĉiuj landoj. Julinio Strasser, Czece (Fehér m.), Hungarujo, 8-jaraĝa lernantino, intersangas poŝtkartojn ilustr.

**Z. Löwinger,** lernanto, Budapest IX, Meŝter str. 9-1-27, deziras intersangi poŝtkartojn ilustr., poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn. Vilhelmo Gerzabek, lernanto, Budapest IX, Tompa str. 13-11-24, deziras intersangi poŝtkartojn ilustratajn kun ĉiuj landoj.

Mi serĉas 50 gekorespondantojn por ĉi tieaj gekursanoj; ĉiu ricevos respondon! Jozefo Major, Budapest IX, Remete str. 56-II-4.

**Erich Gleis,** Breslao 15 (Germ.), Goethestr. 67, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj intersangi poŝtmarkojn.

**Familjo Max Hofmann,** Chemnitz (Germ.), Nordstr. 5 Eg, deziras korespondi per poŝtkartojn ilustritajn kaj senpa- gajaj gadventistoj de ĉiuj landoj.

**Varsovio, Polio,** str. Ziota 31, s-ro Konstanty Chmielewski, deziras intersangi kun diversaj esperantistoj tiumondaj. Kiu sendos al mi diversajn poŝtmarkojn militajn, ricevos de mi rekompen- cas diversajn neuzitajn kartojn ilustritajn.

## Rozoleo bulgara

unuakvalita, por 20 000 bulg. levoj (16 000 mk.) la kilogramon.

Seriozaj aĉetantoj sin-turnu al  
**Iv. Krestanoff,**  
Karlovo (Roza Valo), Bulgario.

## Peto.

Samideanoj-ingeneroj, povantaj havigi in- formojn kaj katalogojn de firmoj konstruantaj ventmotorojn kaj ventturbinojn por akvokonduko kaj elektrejoj, estas insiste petataj skribi al studentino **Feliksfo Ŝiŝko,** Warszawa (Polio), Hoza 42-8.

## Svisa Esperanta Servo (SVESO).

- Komunikas kun ĉiuj Esp. servoj.
  - Havigas al la svisa esperantistaro ĉiuspecajn esperantajojn.
  - Kunmetas privatajn kaj grupajn bibliotekojn.
  - Faciligas la abondon de Esp. ĵurnaloj.
- Sin adresi al la del. de UEA en Montreux (Svis.), 65, Grand' Rue.